# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' . --- Sceno tri

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la trian scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'.*** La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

| | |
|---|---|
| 1. pena -------------------- | A) cedi |
| 2. kulmina -------------------- | B) elektronika komunikilo |
| 3. koordinatoj -------------------- | C) fizika komunikilo |
| 4. kontrakto i -------------------- | Ĉ) homo kies tasko estas lernigi |
| 5. fundamenta -------------------- | D) homo kiu interpretas leĝojn |
| 6. postuli ion -------------------- | E)homo kiu provas konvinki vin |
| 7. teorio -------------------- | F) homo kiu veturigos vin al |
| 8. eksperimento -------------------- | G) Venuso |
| 9. modera --------------------- | Ĝ) insistegi |
| 10. kontinento --------------------- | H) parola komunikilo |
| | Ĥ) paroladi |
| | I) pens-kapablo |
| | J) publikigi |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. Klari opiniis ke Esperanto prosperos se oni varbos inter ___________.**
a) juristoj
b) instruistoj
c) reklamistoj
ĉ) komputistoj

**2. 'Kvalito antaŭ kvanto' estas ŝlosila elemento de la ____________.**
a) Manifesto de Raŭmo
b) Manifesto de Prago
c) Deklaracio de Tyreso
ĉ) Principaro de Frostavallen

**3. Ŝajnas al Mart ke ili neniam havos _______ nombron da esperantistoj.**
a) keditan
b) kreditoran
c) kretenan
ĉ) kredindan

**4. Proponoj kaj sinproponoj sur __________.**
a) poŝtuko
b) poŝtkarto
c) enskribiga formularo
ĉ) kompakt-disko

**5. Kion oni vidas tunel-fine?**
a) fumon
b) gumon
c) lumon
ĉ) rumon

**6. Se estus nur unu esperantisto, tiu devus esti ________ elstara.**
a) statute
b) statue
c) stature
ĉ) statistike

**7. La esperantistoj elektu siajn agad-kampojn pli ________.**
a) zorge
b) larĝe
c) urĝe
ĉ) kuraĝe

**8. Varbi inter juristoj estas la ideo de ________.**
a) Miko
b) Alano
c) Krista
ĉ) Trev

**9. Ĉi tiujn ___________ ni jam sekvis multfoje.**
a) komentariojn
b) komentojn
c) kondimentojn
ĉ) argumentojn

**10. Ni vidos la lumon ĉe la fino de la __________.**
a) ponto
b) tunelo
c) viadukto
ĉ) aŭto-ŝoseo

### 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon.*

**Sceno 3**

| | |
|---|---|
| L I T A K V O | ☐ _ _ _ _ ☐ ☐ |
| M A G R O J N T E N U | _ _ _ ☐ ☐ _ _ _ _ ☐ _ |
| P O J N O S P R O N I | ☐ ☐ _ _ _ _ _ _ ☐ _ _ |
| S U Z U K E | ☐ _ ☐ _ ☐ _ |
| J U N I S O N T R I S T | ☐ _ _ _ _ _ ☐ _ _ _ ☐ _ |

La esperantistoj frontas teruran dilemon... trilemon ... polilemon.
Ili meditas je kiuj fakaj grupoj direkti siajn varbajn agadojn.
**Por esprimi tion sufikse...**

_ _   _ _ _   _ _   _ _ _ J   _ _ _ _?

### 4) DEMANDOJ

1. Bur proponas ekstreme raŭmisman ideon: se ne eblas havi kvanton, ni havu kion? Kio estas lia preciza propono?
2. Mike opinias ke Esperanto progresos sub kiuj kondiĉoj?
3. Alano opinias ke Esperanto progresos sub kiuj kondiĉoj?
4. Klari opinias ke Esperanto progresos sub kiuj kondiĉoj?
5. Trev opinias ke Esperanto progresos sub kiuj kondiĉoj?
6. Krista opinias ke Esperanto progresos sub kiuj kondiĉoj?
7. Kiuj el tiuj fakaj grupoj estas laŭ vi plej bezonataj por Esperanto?
8. Laŭ vi, inter kiuj grupoj oni devas pleje varbi por Esperanto?
9. Kiuj estas la ĉefaj obstakloj kiam oni varbas por la lingvo?
10. Kiujn ideojn vi havas por pli sukcese antaŭenigi la lingvon? *

** Urano kaj Pluto prefere ne rolu en viaj respondoj.*

**5) PARIGU**

*Jen fraz-komencoj kaj fraz-finoj pri la sceno. Ligu ilin. Por la intelekta pigreco, vi havas neniujn superfluajn fraz-finojn. Jes, mi scias. Mi estas tro bonkora.*

| | | |
|---|---|---|
| 1. Alano pensas ke oni devas konvinki... | A | biciklistojn. |
| 2. Klari pensas ke oni devas konvinki... | B | fervojistojn. |
| 3. Trev pensas ke oni devas konvinki... | C | instruistojn. |
| 4. Krista pensas ke oni devas konvinki... | Ĉ | juristojn. |
| 5. Bur pensas ke oni devas konvinki... | D | matematikistojn. |
| 6. En IAdEM ni trovas... | E | muzikistojn. |
| 7. En MEL ni trovas... | F | reklamistojn. |
| 8. En BEMI ni trovas... | G | statistikistojn. |
| 9. En IFEF ni trovas... | Ĝ | taksi-ŝoforojn. |
| 10. Fakaj asocioj neglektas kaj neniu volas konvinki... | H | unu elstarulon. |

.

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**